# BONA ESPERO



**Cirkulero 57**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.**
prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, Tel.: 02902-57460
retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 2001-12-14

Karaj geamikoj kaj subtenantoj,

ĉi tiu rondletero fine de nia jubilea jaro ĉi-foje montriĝas en triparta formo: post la kontribuo de Ursula Grattapaglia sekvas persona raporto de la germana volontulino Gaby Mestwerdt pri ŝiaj duonjaraj spertoj en Bona Espero kaj la finon faras kelkaj rimarkoj el nia vidpunkto.

Ni komencas per la lasta letero de Ursula al ni:
"Spite al la kriza monda situacio, nia pac-insulo Bona Espero bone progresas. La malfermo de nia lernejo ĝis la kvara elementa klaso, montriĝis saĝa decido, ĉar niaj etuloj lernas trankvile kaj gaje sen la ofte negativa influo de la publika lernejo de Alto Paraiso.Adarci, nia instruistino, kiu en decembro diplomiĝos pri historio en la fakultato de la urbo Formosa, direktas nian lernejon helpata de nia eks-lernantino Ursula Pereira dos Santos kaj de Cassius Desconsi (21jara), brazila esperantisto el Pato Branco, urbeto en Paranao. La instruado de Esperanto estas sub la zorgo de unu germana volontulo el Essen, Tobias Spelz.

Post la granda reformo de unu el niaj loĝdomoj, ni komencis, antaŭ nelonge la plibonigon kaj reformon de la lernejo, anstataŭante malnovajn pordojn kaj fenestrojn kaj konstruante novan banejon.

En Alto Paraiso, Bona Espero daŭre kunlaboras kun la lokaj instancoj en la kampo de edukado kaj socia servo. Nuntempe la Rotaria Klubo de Alto Paraiso, kies plejparto de la membroj parolas aŭ lernas Esperanton, kunvenas regule en nia urba sidejo. Rotario Internacia subtenas ĉijare Bonan Esperon, konsiderante nian projekton digna je internacia helpo.

En la ĉiutaga mastrumado(kuirado, prizorgo de parto de la infanoj kaj zorgado de la instalaĵoj) bone kunlaboras esperantista geedza paro Moacir kaj Gloria el Recife.

Ĉirkaŭ nia pac-monumento la bonesperanoj kun la 35 infanoj, el kiuj 6 venas nur dumtage per buso de la urba administrado, preĝas por la Monda Paco en la plena konvinko ke tio helpos bremsi iom la ventojn de milito, kiuj bedaŭrinde blovas sur nia planedo.
En tiu espero ni deziras al vi: Bonan Kristnaskon kaj Pacan Novan Jaron!"

Por ni tre ĝojiga estas denove la bonega laboro en la lernejo de Bona Espero. Tio i.a. certe estas kaŭzita de la grandega engaĝiĝo de Adarci. Ni nur povas esperi, ke ŝi daŭre restos en Bona Espero.

Kaj jen partaj spertoj kaj komprenoj de Gaby pri ŝia tempo en la infanvilaĝo:
„Por mi mia relative mallonga restado en Bona Espero (kompare al la jam 44jara pasinteco kaj espereble eterna estonteco) estis tre tre bela, interesa, instrua, konsciiga tempo, dum kiu mi rajtas koniĝi kun multegaj karaj, feliĉaj, idealistaj kaj engaĝiĝantaj homoj.
Por homo, kiu kiel mi pasigis sian junaĝon en mondo kun tro de abundo de materio ĝenerale kaj de komunikiloj speciale, la duona jaro en Bona Espero ankaŭ estis la fokusigo ree sur la esencon.

Forta kaj nelacigebla kunlaboro kiel fundamento ebligas minimume al kelkaj infanoj de la regiono grandiĝi senzorge kaj sekure en nedifekta grandfamilikomunumo kaj ricevi bonan lernejan kaj vivan edukadon.

Komence de mia restado en Brazilo eblis al mi ekskursi al la proksima Cavalcante okaze de prelego de Ursula antaŭ ĉ. 300 lernantoj pri "La digno de la virino". Tie mi jam post unu monato povis konstati diferencon inter "niaj" infanoj kaj tiuj tie: laŭ mia percepto la infanoj de Bona Espero havis multe pli feliĉajn kaj pli senzorgajn mienojn ol la al mi nekonataj samaĝuloj tie.

En la mizerkvartalo de la urbeto mi konsciiĝis ankoraŭ pli, el kiuj cirkonstancoj "niaj" infanoj devenas: argilokabanetoj sen flua akvo, ludantaj infanoj inter rubomontoj, ofte 20 personoj vivante en plej malgranda spaco, multe tro junaj patrinoj ofte kun siaj 10 infanoj, forlasitaj de la patroj ...

Pasigi la junaĝon en Bona Espero do signifas por la infanoj – kaj per tio ankaŭ por la evoluo de la brazila societo – rivevi edukadon al memstare kaj responskonscie pensantaj kaj agantaj homoj. Ŝanco, de kiu mi deziras, ke ĝi ankoraŭ longtempe ekzistos en Bona Espero kaj mondvaste multobliĝos por ĉiuj infanoj.



La ideala momento por ĉiuj, kiuj pripensas iri al Bona Espero por kunlabori tie, estas: aŭ inter lerneja kaj profesia klerigo aŭ – kiel mi – inter du diversaj laboroj kaj sanĝo de loĝloko aŭ aliaj vivŝanĝoj. Obstakloj, kiel sekkurigo hejme kaj eksterlande, vakcinadoj, necesaj oficejaj plenumoj, same kiel diri adiaŭ al familio kaj amikoj por ioma tempo, nur komence ŝajnas kelkfoje nevenkeblaj. Por mi tiuj venontfoje tute ne hezitigos min."

Anstataŭante por ĉiuj subtenantoj kaj geamikoj de Bona Espero ni ŝatas koregе danki ĉi-foje Gaby pro ŝia malegoista, sukcesa kaj certe ne facila helpo rekte surloke. Ŝia raporto eble ja povas instigi ankoraŭ aliajn junajn homojn plani kaj agi simile.

Ĉi-rilate ni tre ĝojus, se vi – krom eventualajn dezirojn, instigojn, kritikajn rimarkojn k.s. – sciigus al ni ankaŭ proprajn travivaĵojn, spertojn k.s., por formi nian cirkuleron pli bunte, pli vive kaj per tio pli interese.

Almenaŭ inter niaj junaj konatoj la intereso rilate al Bona Espero lasttempe frapante kreskis. Gimnazianino laboris tie kvin semajnojn dum la lastaj somerferioj kaj poste faris impresan lumbildprelegon pri la bieno kadre de kurso en popolaltlernejo.

– Tri junaj viroj lernis resp. lernas Esperanton nur por kunlabori iam en Bona Espero kelkajn monatojn.. – Krome ĉi-jare du gimnazianinoj skribis jar- kaj fakreferaton pri la sama temo.

Kaj kiuj novaĵoj ni povas annonci el nia organizaĵo? Brigitte Gemke (antaŭe Löffler) pro personaj aferoj ne plu havis tempon esti nia kasistino kaj devis ĉesigi la taskon. Ni koregе dankas ĉi tie al ŝi pro ŝia ne facila, sukcesa laboro. Dum la lasta jarkunveno Dagmar Rahn estis elektita kiel nova kasistino. (Vidu la novan adreson suben.)

La subtena organizaĵo ankaŭ ĉi-jare denove informadis dum multaj aranĝoj pri la evoluo kaj laboro de la infanvilaĝo. Eble kiel rezulto de ĉi tiu regula ĉeesto okazis ekz. en Herzberg jam dua aukcio same kiel dum la lasta PSI tombolo favore al Bona Espero. Intertempe preskaŭ kompreneblaj estas la multnombraj magiaj prezentadoj de Don Espero (alias Bernd Schönberner).

Nian esperon (ne nur) pri la venonta jaro ni metas antaŭ ĉio sur la sano de Ursula kaj Giuseppe, ĉar – ĉu nun por Gloria kaj Moacir aŭ iu ajn alia paro – la sukcesa daŭrigo de la preskaŭ 30jara grandioza evolulaboro estus malfacilega entrepreno por ĉiuj eventualaj posteuloj.

Karaj subtenantoj kaj geamikoj, ni ŝatas fini nian leteron kun nia korega dankesprimo al ĉiuj de vi, t.e. ankaŭ al niaj novaj helpantoj, kiujn ni salutegas en nia komuneco. Bonvolu, konservi vian fidelecon al Bona Espero plue kaj subteni same dum la venonta jaro la zorgantojn kaj – kompreneble ĉefe –la infanojn!

Mi deziras al vi ĉiuj nome de la estraro:

***Ĝojan kristnaskon same kiel bonan kaj precipe pacan jaron 2002!***



**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**
kasistino: Dagmar Rahn, Hirschfeldstr. 3, D-59581 Warstein, ☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328